

POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XVII WARSZAWA—DECEMBRO 1922 J. № 3 (89)

POLLANDA FAKO.

Malnova kaj nova Pollando.

En 1795 malaperis Pollando de la karto de Eŭropo. Potencaj kaj tro avidaj najbaroj englutis ĝin dum tri dispartigoj, preskaŭ sendefendan, kvankam defendigantan malespere. La nacia heroo, Tadeusz Kościuszko, grave vundita dum batalo ĉe Maciejowice, estis kaptita per Rusoj, la lasta pola reĝo Stanisław August, abdikinte la tronon, forveturis Petersburgon, kie li mortis iom poste.

Tiu katastrofo okazis en la momento, kiam pola nacio vekigadis de longa dormo, kiam ĝi volis ripari la internan malordon kaj ekkomenci novan vivon. En la sekvinta nokto de longa mallibero brilis al polaj patriotoj la rememoro pri glora Konstitucio de 3 Majo 1791, tre progresa kaj liberema, la unua en Eŭropo konstitucio (la unua franca konstitucio sekvis post 4 monatoj). Sed la malamikoj atentis. Ili komprenis, ke tiu momento estis la lasta, ke post nelonga tempo Pollando plu ne estos facila rabajo, kaj ekrapidis ataki ĝin perfide. Rusio, Prusio, Aŭstrio dividis inter si la teritorion de miljara eŭropa regno, kiu ŝirmis la Okcidenton kontraŭ barbaroj kaj portis malproksimen la semojn de kristana kulturo.

La malnova Pola Respubliko ne estis ŝtato ununacia. Trovigante ĉe la limo de eŭropa civilizo, ĝi altiris al si pli malfortajn najbarojn, kiuj sentis, ke sen ĝia ŝirmo ili pereos en la maro de orienta barbarismo, ne scipovos rebati la atakojn de duonsovaĝaj gentoj orientaj. Jam en XIV jarcento pola reĝino Jadwiga edziniĝas je granda duko litova Jagiello kaj tiel sigelita estas la unio de Pollando kun Litovio, kiuj komencas kvincentjaran komunan vivon, prezentante unikan en la historio de tiuj tempoj ekzemplon de memvola unuiĝo de du malsamaj popoloj,

kluj konservas internan sendependecon kaj kune defendigas kontraŭ malamikoj. Pro samaj kaŭzoj al la pola ŝtato aliĝis ankaŭ teroj ukrainaj, kaj tiamaniere la respubliko konsistis el tri ĉefaj partoj: Pola Krono, Granda Duklando Litova kaj Rutenio, aŭ Ukrainio.

Tiel konstruita granda ŝtato sciis dum longaj jarcentoj defendiĝi efike kontraŭ eksteraj atakoj. Sed venis la tempo, kiam ĉirkaŭ ĝi troviĝis tre vastaj kaj potencaj regnoj—la Rusa Imperio, la Aŭstria Imperio, la fortike disvolviganta Prusa Regno. Iliaj gvidantoj, fariĝante pli kaj pli fortaj, fariĝis samtempe pli kaj pli avidaj. En blinda streĉo al pligrandigo de siaj teritorioj ili ne haltiĝis antaŭ perfida krimo: ili profitis la momentan malfortecon de pola najbaro, interkonsiliĝis pri ĝia mortigo kaj jen, en la fino de kultura XVIII jarcento, mirigitaj popoloj de Eŭropo asistis al nekredebla barbarajo de dispartigo de civilizita eŭropa popolo inter same civilizitaj kaj same kristanaj eŭropaj ŝtatoj.

Komenciĝis por Pollando la 120-jara mallibero. La celo, kiun proponis al si la persekutantoj: neniligi la polan naciecon—estis neatingebla himerio. Oni ne povas detrui vivantan kulturan nacion, same kiel oni ne povas ŝanĝi kontinenton en maron, aŭ de montaro fari ebenaĵon. Nacia konscio estas fenomeno natura, aliĝi ĝin superas la fortoj de homoj. Tion pruvis bone la pola popolo, kiu malgraŭ sennombraj turmentoj ne nur konservis vianke la trezorojn de sia lingvo kaj civiliza aparteco, sed, ne atentante sian okulfrapantan plimalforton, senĉese ribelis kontraŭ potencaj persekutantoj.

En 1809 — 1814, 1830 — 1831, 1846, 1848, 1863 okazis regulaj militoj inter Poloj kaj la grandegaj armeoj de Rusoj kaj Germanoj. En la batalkampoj de tuta Eŭropo, kie nur ekbrilis eĉ plej malforta lumstrio de espero, ĉie estis polaj herooj, batalante por tiu, kiu ŝajnis promesi al ili la liberigon de patrujo.

Kaj venis la jaro 1914. Denove levigis polaj legioj, ili militis en Pollando kontraŭ Rusoj, ili militis en Francio kontraŭ Germanoj. Je la unua sciigo pri proksimiganta batalbalto en novembro 1918 ekstaris fiere la pola nacio. Nearmita popolo, laboristoj, knaboj lernantoj forprenis la pafilojn al fremdaj soldatoj. En kelkaj tagoj la plejparto de pola tero estis libera.

Kaj la pactraktato proklamis laŭte la rajton de ĉiu nacio al sendependa ŝtata vivo. La popoloj de Eŭropo fondis fine sian societon, kiu devas zorgi pri justeco en

internaciaj rilatoj. En nuna momento, certe, ĝi ne estas ankoraŭ perfekta, ne kunigas ĉiujn naciojn de la mondo, ne havas sufiĉan forton. Sed per ĝia kreo estas starigita potenca kaj vivoriĉa principo, kiun postulis grandvoĉe la historio kaj la bona prudento.

Nuntempa pola ŝtato ne similas la malnovan. Ĝi konsistas nur el teritorioj etnografie polaj. La etnografia Litovio deziras memstaran ŝtatan vivon. La Ukrainio apartenas al unuiĝo de rusaj sovietaj respublikoj.

Moderna Pola Respubliko estas ŝtato, bazita sur vasta demokrata principo. La Konstitucio de 17 Marto 1921 certigas la elektraĵon al parlamento al ĉiu plenaĝa pola civitano, sendepende de la sekso. Ĉiu religio, ĉiu nacia lingvo estas egale respektataj. La ŝtato okupiĝas pri ĝenerala publika klereco, protektas la laboron, subtenas malsanulojn kaj malfortulojn. Neniaj privilegioj ekzistas por ia ajn klaso de la socio.

La Poloj ne sentas malamon al siaj hieraŭaj premitoj. Ili bone komprenas, ke ne la nacioj rusa kaj germana persekutis ilin, sed la utopiistaj registaroj, kluj siajn proprajn naciojn kondukis al katastrofo. En la nova Eŭropo la Poloj deziras kune kun siaj najbaroj subteni ĉiun celadon, kiu garantios al la popoloj de la mondo ilian liberecon.

Pollando, kiu tiel multe suferis pro maljusteco de aliaj, volas fariĝi laboranto de justa kaj feliĉa estonto!

Jan Kostecki.

LITERATURA FAĤO.

Sur margeno de Stranga heredajo.

Unuan pekon oni kutimas pardoni, sekvantan oni fine ankaŭ povas indulgi, tamen se la trian fojon iu montriĝas nekorektema, oni devas nepre pripensi, kiel puni tian obstinan pekulon.

Ion simlan ekpensis samideano, konscianta neceson de esperantista literaturo, sed preferanta kolektadon de poŝtmarkoj ricevinte katalogon de la librejo Hirth & Sohn. Luyken aperigis „Stranga heredajo“, pli ol 300-paĝan originalan romanon. Tio ja estas tria peko de lia esperantista vivo.

Stranga homo! Li mem meritas esti ĉefpersono de romano! Ĉu ne? Milfoje li legis en la gazetoj, ke la espe-

rantistoj bezonas sian propran literaturon, kaj en sia facilanimeco li ekkredis tion senprincipe kaj verkis „Paŭlo Debenham“. Sed tiam montriĝis la vereco de l'gazetaraj sopiroj al la literaturo: malgraŭ tio, ke la romano estis originala, malgraŭ, ke ĝi estis preskaŭ unua romano esperanta—la du verkoj de karmemora Dro Valienne apartenas al alia kategorio — malgraŭ, ke ĝi estis bona romano, bona pro sia literatura valoro kaj bona pro sia tendenco kaj bona pro la senmakula lingvo, la verdstelaj ĵurnaloj traktis ĝin laŭ la tradicia skemo por U. E. A. — jarlibroj: en la „Bibliografioj“ aperis titolo, nomo de l'aŭtoro, nomo de l'eldoninto, nombro de paĝoj, prezo en spesmiloj kaj sube notoj: interesa, leginda, bonstila k. t. p. Ĉar tamen ĉiu sinŝatanta kaj plenŝatata esperantista gazeto pri ĉiu absurdaĵo tion saman notas, do la legantaro prave kaj brave kredis la bibliografiajn notojn kaj la romanon ne legis.

Tio ne senkuragiĝis la aŭtoron. Kun angla obstineco, germana persistemo kaj mirinda amo al Esperanto li laboris plue kaj baldaŭ la redaktejoj estis surprizitaj per po du ekzempleroj de „Mirinda amo“; po du ekzempleroj, ĉar sen du ili ne estus enmetintaj en la „Bibliografio“ la titolon, nomon de l' aŭtoro, tiun de l' eldonejo, nombron de paĝoj kaj prezon en spesmiloj, kune kun noto „interesa, bonstila kaj leginda“. Kompreneble kun des pli sama rezultato ĉe la leganto.

Pli ol duonjaron post la apero de „Mirinda amo“ mi estis en metropolo de unu Eŭropa tiutempe ĉefŝtato, en kiu ekzistis dekkvar esperantistaj grupoj tre multnombraj kaj viglaj, en kiu la esperantista vivo pulsas kaj bolis, en kiu aperadis tre bona esperantista gazeto. La nomon mi ne citas, por ne fari al ĝi reklamon; cetere ĝi estas ne-grava, ĉar ĉie estis same. Kompreneble mi spiris tiun vivon plenbruste, partoprenis ĉiujn kunvenojn kaj aŭskultis ĉiujn poeziajn abortojn de karaj samideanoj. Dum interparoloj pri la literaturo mi konvinkiĝis, ke la nomo de Luyken malgraŭ la aperintaj (jes!) bibliografiaj notoj en la loka „... Esperantisto“ estas plenplene nekonata. Ĉar kiel fremdulo mi estis iom „ekzota“ kaj oni kelkfoje min petis pri parolado, mi decidis „eltrovi la Amerikon“ kaj elektis kiel temon la romanojn de H. A. Luyken. La aŭskultantoj estis miregigitaj kaj ne volis kredi, ke tiaj romanoj ekzistas, sed la plej mirigita estis la Redaktinto de „... Esperantisto“. Kelkajn tagojn poste mi vizitis Sinjoron Redaktinton (ĉiam per granda R!) kaj en lia ka-

bineto vidis sur unu tablo imponajn albumojn de poŝtkartoj kun markoj „bildflanke algluitaj“, sur alia inter amaso da polvokovritaj broŝuroj, afiŝoj, gvidfolioj kaj jarlibroj — „Paŭlo Debenham“ kaj „Mirinda amo“. Po du ekzempleroj...

Tiel estis en la arkadiaj tempoj antaŭ la Eŭropa milito, kiam ekzistis Ĉekbanko Esperantista kaj la Ligo de Nacioj ne interesigis ankoraŭ pri Esperanto.

Pro tio, ke dum la milito la esperantistaj gazetoj ne aperadis, ĉar la Redaktantoj trovis al si pli noblan okupon, la obstina aŭtoro silentis. Apenaŭ tamen la lastaj kanonoj silentigis, li ekpafis kontraŭ la revekiganta esperantista gazetaro per po du ekzempleroj de nova romano.

La malmultajn, bedaŭrinde tre malmultajn ŝatantojn de H. A. Luyken certe interesos la progreso en la disvolvigo de lia verkista talento. Ĉar kiu almenaŭ iom atente tralegis liajn du unuajn romanojn, tiu certe konstatis tiun disvolvigon: „Paŭlo Debenham“ montras veran kaj sinceran talenton, al kiu tamen la plumo iom tremetis en la mano kaj mankis lerteco en la arango de kelkcentpaĝa romano. La sekvanta verko estis paŝo antaŭen: la aŭtoro alkutimigis jam al sia okupo, per certa kaj lerta mano disĵetadis sur la paĝojn helajn bildojn kaj nigrajn makuolojn, tamen la kompozicio ankoraŭ hezitis. La verkadon de romano oni povas kompari kun plano de arkitekturo: ne sufiĉas desegni helan kaj imponan fasadon, la dismeto de l'ĉambroj interne devas esti celkonscia kaj taŭga. Ĝuste en tio, same „Paŭlo Debenham“ kiel ankaŭ „Mirinda amo“ ofte kriplis; en la plano de ambaŭ romanoj estis ĉambroj, al kiuj mankis eniro aŭ eliro kaj koridoroj multe heligitaj aŭ salonoj iom tro mallumaj. La kaŭzo de tiuj mankoj, krom la noviceco en la verkista agado, estis verŝajne la rapideco de l'verkado; en la nobla dezirego krei nian originalan literaturon, tuj kaj multe, la aŭtoro skribis per ambaŭ manoj samtempe — „Mirinda amo“ sekvis „Paulon“ post neplena unu jaro — ne estas do mirinde, ke mankis tempo por pripensi la planon. Ankaŭ mankis nuancoj en la karakteroj de personoj: Luyken konis nur du karakterojn: pli blankan ol anĝelo kaj pli nigran ol diablo; ĉar tamen diablo laŭ instruoj de ia tre kredinda vartistino estas ankaŭ anĝelo, kiu estis iom malĝentila kaj ne obeante sian panjon iris en inferon kaj malpurigis per haladzo, do envere en la romanoj troviĝas en ĉiuj personoj sole unu karaktero, nur pentrite de S-o Luyken dekstre per kalko kaj maldekstre per karbo, aŭ inverse.

La granda milito havis terurajn sekvojn kulturajn kaj ekonomiajn: mortigis „La Revuon“ kaj „Lingvon Internacian“ kaj malbonvalutigis la spesmilon, kio kaŭzis la bankroton de Ĉekbanko Esperantista. Tamen oni ne devas malbeni la grandan militon, ĉar ĝi silentigis centon da esperantistaj gazetoj, kiuj tre bone povis ne ekzisti; ĝia ĉefa tamen merito estas la mirinda influo sur la talenton de Luyken. Dev'gite malrapidigi sian laboradon, li havis la tempon pripensi ĉiufanke la temon, desegni kaj certe multfoje korekti la planon de l'romano, enpenetri en la animprofundon de la herooj. Tial la „Stranga heredaĵo“ ĉiurilate kontrastas kompare kun la du unuaj verkoj. Al ĝia forta interna konstruo oni nenion povas riproĉi, ĉiu situacio estas ĉiam motivita sekvo de antaŭa, nenie oni trovas logikajn surprizojn. En „Paŭlo“ aŭ „Mirinda amo“ ŝajnis al la aŭtoro, ke li skulptas superbomojn el alabastro aŭ bronzo, dume ili estis figuretoj el *papier-mâché* sen karno, sen vejnoj kaj sen nervoj. En „Stranga heredaĵo“ neniu persono estas malvera. En ĉiuj pulsas varma, ruĝa sango; ili estas bonaj aŭ malbonaj, aŭ ĝustadire agas bone aŭ erare, sed ĉiam home. Luyken ne prenis ilin el sia religie ĉu sekte inspirita imago, sed studis en sia ĉirkaŭaĵo. Tial ili estas veraj.

Ĉi-tie necesa estas malgranda rimarko. Luyken estas anglo aŭ angl'ginto kaj kiel tia, apartenas al iu el multaj tiaj sektoj; estas ĝia fervora apostolo kaj deziras siajn dogmojn kontrabandi al la leganto. Felice la formo de tiu kontrabando estas sufiĉe milda kaj nealtruda, ne minacas la leganton per gusto kaj similaj bongustaĵoj de infero, sed simple diras: Agu bone. Sen tiu tendenco la aŭtoro ne imagas al si romanon, ĉu ĉiam por la bono de l'literaturo, povus esti diskutinde; tendenco estas danĝera afero — povas malaltigi la artvaloron kaj ne konvinki — speciale, kiam ĝi estas donita en iom pli granda kvanto. „Paŭlo“ kaj „amo“ havas kelkajn gramojn tro multe, en „Stranga heredaĵo“ la aŭtoro estis iom pli ŝparema kaj tio utilis al la verko.

Kun la sektano konsekvence ligiĝas la malŝato al spiritismo, hipnotismo kaj ĉiuj parencaj ismoj. La aŭtoro asertas, ke naŭdek du kaj duono da procento da surtera malbono havas sian fonton en ili. Kvankam plena ignoranto, mi permesas al mi esprimi la impreson, ke Luyken estas pli apostole fervora ol science prava; tiaj ismoj naive kulturataj povas en ekstrema okazo histeriigi iom neivan maljunan fraŭlinon, pro kio ankoraŭ ne fariĝas truo en la

firmamento, sed de tio ĝis krimo estas ankaŭ malproksime. Kaj science kaj serioze esplorataj ili eble heligus iun angulon de homa horizonto, pro kio oni estonte povus ilin beni.

La plej rimarkinda en la verkista disvolvigo de Luyken estas la kresko de l' — estu permesite tiel ĝin nomi — esperantista memkonscio. Interese estas observi, kiel en preskaŭ ĉiu nova originalaĵo Esperanto okupas ĉiam pli gravan rolon. Tre bone oni povas tion studi sur la tri ĝisnunaj romanoj de Luyken. En la du unuaj la heroo portas la verdan stelon en la butontruo, sed estas iom per ĝi ĝenata, kaj juras je ĉiuj sanktaĵoj, ke li estas Esperantisto kaj ke tiu idiomo estas ideala afero, sed kvazaŭ mem tion ne kredas kaj nin permesas tiom kredi je tio, kiom li mem kredas. „Stranga heredaĵo“ estas tiurilate granda, jam ne paŝo, sed salto antaŭen. La agado okazas preskaŭ senescepte en verdsteŭla komunumo, en la heroo la aŭtoro provas skizi — kaj tion oni devas akcenti — sufiĉe sukcesplene, tipon de esperantista pioniro kun kutimaj al li prozelitaj fervoro kaj... parolemo pri la ideo, kiu kiel ĉiam, ankaŭ en realeco, pli flugpendas en nebulaĵoj ol paŝas sur la tero de efektivo. La romano komenĉiĝas per resonoj de ĵus finiĝinta iu el la esperantistaj kongresoj, resonoj ekstreme trafe reproduktitaj, kiel povas konstati ĉiu almenaŭ unufoje partopreninta universalan kongreson de Esperanto. Kaj tiu ĉi verda fadeneto ekŝpinita ĉe la Kongreso volviĝas tra ĉiuj paĝoj de l' romano en tre interese, kvankam, kaj tion oni devas laŭdi, ne tro altrudema maniero, tra anglaj grupoj esperantistaj, akompanas la heroon en lia aventurplena — eble iom nekredinda *) — vojaĝo tra Ameriko kaj fariĝas konsola bandaĝo sur batalejoj kaj hospitaloj de l' Eŭropa milito. La kvanto tamen de tiu „esperantisteco“ en la romano tre laŭdinde ne estas tro granda, troviĝas da ĝi ĝuste tiom kiom tio repondas al la efektiva stato de nia movado. Tre prave, ĉar per tio la romano fariĝas valora dokumento por estonta historiisto, al kiu la statistikoj de nia movado en la lastaj jaroj antaŭ la milito estos skeleto kaj la verkoj de Luyken liveros karnon kaj spiriton.

La konsiderado de „Stranga heredaĵo“ konvinkigas, ke nia literaturo havas talenton, kiun oni ne povas pre-

*) Ĉi tie la aŭtoron bonvolu ne ofendi la rimarko, ke se oni nepre deziras imiti aliajn verkistojn, oni elektu la plej bonajn; malplej rekomendinda eble ŝajnas esti Gaston Leroux.

terpaŝi senatente; konvinkigas, ke tiu talento ne atingis ankoraŭ maksimumon de sia disvolviĝo; kaj ĝi pruvas, ke oni povas havi la esperon, ke ĝin sekvos, permesu ho verdstela Feino! longa vico da ĉiam pli bonaj verkoj.

Ĉar Luyken estas stranga homo! Li naive ekkredis al konstanta ripetado de niaj gazetoj, ke ni nepre bezonas nian propran originalan literaturon, kaj li kreas ĝin. Ne timigas lin la silentemo de tiuj gazetoj — preskaŭ duonjaro jam pasis de post apero de „Stranga heredaĵo“ kaj oni ankoraŭ ne trovis unu recenzon, konvenan al ĝia valoro. Stranga homo! Austataŭ facile perlaboradi famon per dissendado de bildflanke stampitaj poŝtkartoj al la esperantistaj Redaktantoj—la plej efikplena, kiel oni scias, metodo por akiri gloron de eminentulo—li superŝutas ilin per romanoj. Kompreneble po du ekzempleroj.

Kara Strangulo! Verku plue — Vian heredaĵon ŝatos eble ne pli multe ol dek simplaj sed veraj sopirantoj al la originala esperantista literaturo. Tamen estu certa, ke tiu deko pli valoras ol milo da redaktantoj. Ĉar Vi devas ekscii unu sekreton: ili ne faras tion pro malbonvolo, nur ĉar ili ne scipovas—ili ja estas sur-bildflanke stampitaj!

Baroko.

ESPERANTA MOVADO.

Kiel instrui Esperanton?

Se oni volas ricevi bonajn rezultatojn, la instruado ne apartenas al facila tasko. Esperanto ŝajne povus esti escepto. Ĝi estas, vere, tiel simpla, tiel komprenebla por ĉiu normala homo, ke oni povus eĉ rezigni paroli pri la metodo de ĝia instruado. Esperanto, kiel arte farita lingvo, povis atingi en la cerbo de genia persono sian perfektan formon aŭ almenaŭ pli perfektan, ol la plej perfekta lingvo, ekzistanta nun aŭ ekzistonta en la estonteco, sed disvolviĝanta nature.

Tamen aserti, ke oni povas konigi rapide kaj bone Esperanton per iu ajn metodo, estus eraro. Des pli, ke Esperanto, kvankam devene arta lingvo, en la nuna fazo de sia evolucio, estas same natura lingvo, kiel lingvoj

aliaj. Per ĝi parolas de multaj jaroj miloj da personoj. Ĝi do devis far ĝi al ili la sama organika propraĵo, kiel io ajn alia, kun kio ili kreskas kaj pliaĝiĝas.

Kompare kun la aliaj lingvoj, Esperanto, sendube, povas esti alproprigita pli facile kaj pli rapide. En tio estas la supereco de Esperanto. Sed, se ni uzos en ĝia instruado la samajn, tiel nomatajn metodojn, aplikatajn en la aliaj fremdaj lingvoj, ni perdos same vane la tempon, kiel perdos ĉiuj, kiuj instruas kaj lernas lingvojn.

La sperto montras, ke en sia lando fremdan lingvon ekkonos nur tiu, kiu aŭ havas okazon ofte paroli kun siaj proksimuloj, sen „metodoj“; aŭ tiu, kiu estas sufiĉe diligenta, pacienca, senlaca, t. e. pli danke al si mem, al sia karaktero, ol al la persono lia instruanta.

Juste oni diras, ke pia pilgrimo per ĉiuj vojoj atingos Romon. Bedaŭrinde, la esperantistoj, sur la vojo al la konvinkado por sia ideo de konatuloj, renkontas plej ofte nek piajn pilgrimojn, nek eĉ nure pilgrimojn. Kaj en tio kuŝas la kerno de la afero.

Kion do fari por varbi al nia ideo homojn ĝis nun indiferentajn? Se ni povus vete konvinki iun, ke li baldaŭ bone parolos esperante, certe ni havas multe da adeptoj. Sed, plej ofte, la homoj indiferentaj konvinkiĝas baldaŭ, ke akiri Esperanton oni devas per similaĵoj, per kiuj oni akiras (prefere—volas akiri) aliajn fremdajn lingvojn. Alie dirante, oni same perdus la tempon por la lernado, sen vera rezultato. Kaj post kelka tempo de provo oni rimarkas, ke tio, kion oni ellernis, ne estas facile aplikebla al la plej bezona konversacio, ke ankaŭ legi ne ĉion oni povas, ĉar oni devas tro ofte trafoliumadi vortaron, do prefere lasi la komenŝitan laboron kaj okupiĝi per siaj pli praktikaj aferoj.

Laŭ mia konvinko, la ĉefa eraro en la instruado de la internacia lingvo konsistas en tio, ke ni ne nature ĝin instruas. Ĝenerale por la komenco ni donas tion, kio ne devus esti komenco en la lernado.

Al ni ofte ŝajnas, ke tio, kio estas teorie simpla, praktike ankaŭ estas simpla. Ni pensas, ekzemple, ke vortoj en la nominativo estas por la kompreno kaj memoro pli facilaj, ol la samaj vortoj en la akuzativo aŭ en aliaj kazoj. Por la komenco ni ekzemple ne ĉiam donas la plej praktikajn kaj la plej bezonajn esprimojn, kiel: *bonan tagon, bonan nokton, bonan matenon, kiel vi fartas, ĝis la revido*—kaj similaĵoj, ĉar ni supozas, ke sen klarigo de la deveno de tiuj formoj, la lernanto ne komprenos

ilin. Sekve, ni preferas antaŭe diri: bona tago (en la nominativo) mi fartas (en la unua persono), kvankam tiuj frazoj ne havas tiel oftan aplikon, kiel la unuaj.

Mi ne parolas jam pri diversaj banalaj frazoj, ofte renkontataj en multaj, eĉ aliflanke bonaj lernolibroj. Ne banalaj pro nelogikeco, sed banalaj praktike, kiujn ĉiu instruisto devus konsideri balasto por la lernanto.

La kaŭzon de tia konstruado de frazoj en la unuaj lecionoj, renkontataj en lernolibroj, estas facile trovi. Ni supozas, ke la homo ĉion parolas konscie, ke la tiel nomataj pensoj, esprimataj vorte, estas efektive pensoj en la psikologia senco. Kiu ne rimarkis en si aŭ en alia persono, ke oni povas laŭte legi, lafoje laŭte paroli kaj samtempe pensi pri io alia, nenion komunan havanta kun la enbavo de la dicitaj vortoj, tiu ne komprenos eble tion. Tio estas fakto explorebla. La instruistoj de fremdaj lingvoj aŭ forgesas pri tio, aŭ tion ne scias. Tamen ĝi havas grandegan signifon por la serĉado de la tiel nomata plej bona metodo de la instruado.

Al ni ŝajnas, ke la simpleco, ricevita post la profunda analizo de homo matura kaj samtempe de homo, kies cerbo estas, por tiel diri, speciale agordita al certaj analizoj, respondas al la simpla pensado de la homoj ne maturaj ankoraŭ aŭ kies matura mensa disvolviĝo estas malproksima de iu ajn analizo.

Jen diverseco inter la kompreno de la vorto: simpla. Por la homoj, ne pensantaj „gramatike“, estas tute simpla kaj komprenebla la frazo: „bonan tagon“, ĉar ili asocias la vortan esprimon (pli bone—la movadon de certaj organoj, bezonaj por la vorta esprimo) kun la percepto ekz. de homo konata. Tiu esprimo estas mova rezultanto de la percepto. Kaj, se li ekscios, ke tiu frazo estas mallongigo de: „mi deziras al vi bonan tagon“, li komence ekmiros, ke tia simpla frazo estas tiel komplikita.

Sed por kio ĝi estas bezona? Ĉu tia lernanto, ĉiam, renkontante konatan personon, devas memori, ke la simpla: „bonan tagon“ estas lingve komplikita? Kial perdi la rempon por tiuj analizoj dum la lecionoj! Ĝi estas bezona nur tiam, se la lernanto mem ekinteresiĝos pri la deveno de diversaj esprimoj. Sed tiaj lernantoj apartenas generale al la jam menciitaj „piaj pilgrimoj“. La plimulto bezonas lingvon por senpera esprimado de siaj pensoj, t. e., se en la konscio aperos la ideo, ĝi devas tuj elvoki la tutan torrenton da vortoj, kaj, dum ili estas esprimataj, novaj ideoj aperas en la konscio kaj novajn vicojn da vortoj aperigas por la aŭskultantoj.

Konsekvenco, la plej bonan metodon en la instruado de fremda lingvo uzas tiu, kiu ne pensas pri metodo, sed pensas pri la homo, kiun li instruas. La instruisto devas paroli kun sia lernanto pri tio, pri kio li parolus, kiam li ne bezonus uzadi fremdan por la lernanto lingvon.

Jen la tuta metodo.

Oni riproĉos certe: kiel oni povas paroli pri iu temo, se la lernanto nenion komprenas? Tiam mi respondos: tiel, kiel oni parolas eksterlande, se oni okaze troviĝos tie, nenun vorton sciante, nek komprenante. Ĉiu scias, en kio kons'tas tia unua konversacio. La homoj montras tiam reciproke la kapablon de sia motora aparato kaj... almenaŭ primitive sin iel komprenas. Cetere, ĉar la homo estas ĝenerale sufiĉe inteligenta estaĵo, li povas uzi ĉion, kion donis al li lia kulturo (ĉu heredita, ĉu akirita individuale), por komprenigi sian kunulon.

La instruisto havas ankoraŭ tiun superecon rilate al aliaj homoj, ke li, kiel specialisto, povas tiel konduki la konversacion, ke la lernanto grade povas lin kompreni. Kaj ankaŭ, se la lernanto uzos vortojn el sia patra lingvo, la instruisto povas tuj anstataŭi ilin per la vortoj esperantaj. Tiamaniere li aktuale alproprigos al la lernanto esperantaj vortojn, esprimantajn liajn proprajn pensojn.

Oni do vidas konsekvenco, ke la plej facila metodo en la instruado de lingvo ne estas tiu, kiu estas simpla rilate al la konstruo de frazoj, nek tiu, kiu serĉas simplajn rakontojn, sed tiu, kiu respondas al la situacio. Ekzemple, la plej facila komenco por ia sciencisto, estos la temo pri la interesanta lin scienca objekto.

Mi memoras, ke foje, estante en Anglujo kaj ne multe parolante angle, mi aĉetis sciencon libron. La Anglo, kiu akompanis min, miris, ke mi aĉetis tian libron, ke mi certe ne komprenos ĝin, ĉar ĝi estas malfacila eĉ por ne unu anglo. Tamen, konante la francan lingvon, mi konvinkigis, ke mi multon komprenis. Ne grave, ke mia prononcado estis malproksima de la vera kaj ke tiam. eĉ la plej facilan infanan fabelon en la angla lingvo mi preskaŭ ne komprenis.

Ne mirinde. Same kiel infano ne komprenas sciencon lingvon, eĉ en sia patra lingvo, tiel homo plenaĝa, lernanta fremdan lingvon, pli facile komprenos la tekston, konforman al liaj pensoj, ol la tekston de la tiel nomataj facilaj fabeloj por infanoj. Ili lin nature ne interesas, nek bezona estas al li la formo de lia enhavo....

Oni riproĉos eble ankoraŭ, ke en tia maniero ni instruos Esperanton senpense, senplane kaj sensisteme,

kaj ke la lernanto parolos esperante kiel parolus papago, se oni povus ĝin instrui.

Sed tiuj argumentoj nur ŝajne estas seriozoj. Koncerne la unuan argumenton, ke oni alproprigus la lingvon senpense, mi respondus, ke la natura lernado de sia patra lingvo plej parte konsistas el tia senpensa, sed grada akirado de novaj vortoj kaj frazoj. Cetere, la infano ne povas reflekte pensi, ne povas rezoni, ĉar ĝiaj junaj pensoj ne estas ankoraŭ rezonado, prudento. Tamen, la infano kaj poste homo matura, sed ne instruata pri la gramatiko, povas perfekte ekposedi sian patran lingvon, kondiĉe ke li trovas sin en la medio bone kaj korekte parolanta. Fine, ni sincere diru: ĉu ni gvidas nin en la parolo per la lernita gramatiko en la lernejoj?

Koncerne la duan argumenton, ke tiam ni instruus senplane, ankaŭ ne estas malfacile respondi. Ne povas tie ĉi esti ia plano (en la preciza senco de la vorto), ĉar la vivo mem ne estas plana, almenaŭ nia natura parolado, prefere konversacio ne estas plana. Kial do artigi la metodon?

Tamen oni ne povas diri, ke la natura instruado de Esperanto ne estas sistema. Ĉiu metodo estas sistema, se ĝi atingas sian celon. En la natura instruado, la metodo des pli devas fariĝi sistema, ĉar ĝi ĉiam celas doni al la lernanto tion, kion li aktuale bezonas.

La penoj de instruisto estos frukte rekompencitaj, se li dum la konversacio faros la lecionon liberan, gajan, emociigan, ne serĉante eksterordinarajn frazojn, forgesante la gramatikon, devigante la lernanton eble plej ofte partopreni en la parolado, kaj kiam li scios trafe elektadi el nia ĝis nun jam sufiĉe riĉa literaturo la plej konforman tekston, kiu ne nur permesus al la lernanto ĝin kompreni, sed ankaŭ kiu lin instigus al plua memstara legado.

La rapideco de la rezultato dependos de la inteligenteco kaj karaktero de la lernanto.

Mieczysław Kaus.

El la revoj.

*Ofte en vespera horo
kun la freŝa florodoro
revaro alfluas —
kaj per bildoj—iluzioj
aperantaj sonĝvizioj
koron mian skuas.*

*En orbriloj diademaj
fluas revoj perfidemaj
apud mi sin trenas
kaj animon plensopiran
malproksiman spacon miran
ĝi kune forprenas.*

*Kaj ke viv' malhele griza
unutona, seka, ftisa
la animon jugas,
tial ĝi kun la revaro
kiel jam amika paro
vastan mondon flugas.*

*Per la aglaflug' lazuran
ĉielbluon stelpurpuran
kuras ĝi rapide —
kaj freŝecon de aero,
plenan senton de libero
ĝuas ĝi avida.*

*Flugas ĝi en subĉieloj
for de vivobagateloj
kiel larmo pura...
ĝis la bildoj-illuzoj
malaperos kun visioj
de l'ĝuo plezura.*

Eska.

K O M U N I K O J .

Pola Esperantista Societo.

Centrejo (Warszawa, Królewska 19). Ofictagoj: lundo kaj ĵaŭdo de 8 ĝis 10 h. v.

Grupo Warszawa. La 16-an de novembro okazis en la societejo I tevespero, antaŭigita per duonhora prelego de S-no Kaŭs pri esplormetodojn de memoro. Oni decidis organizi tevesperoj konstante ĉiudusemajne, ĵaŭde je 8 h. v. Por venontaj tevesperoj promesis prepari sciencajn aŭ literaturajn prelegojn S-noj A. Czubyński, J. Kostecki, Karolczyk kaj aliaj. Samideanoj, kiuj dezirus prelegi dum tevesperoj estas tre petataj komuniki pri tio al

estraro de P. E. S. antaŭsciligante pri la temoj. Venonta tevespero okazos: 14 de decembro.

Grupo Koluski. En oktobro vic-prezidanto del'grupo S-no Gernande rekomencis kursojn de Esperanto en loka lernejo por 15 personoj.

Grupo Poznań. La 12 de novembro oni solenis en salonego de Zoologia Ĝardeno dekjaran datrevenon de fondo de Esperanto-Societo en Poznań. Pro manko da loko ni presos la detalojn en venonta Numero.

Grupo Vilno. La plej juna nia filio organizigis dank' al agado de vilnaj samideanoj.

La 8-an Novembro okazis organiza kunveno dum kiu oni elektis komitaton, konsistantan: Prezidanto: Universitata Profesoro Jan Muszyński, Komitatoj: Józef Basevicz, Roman Sakovicz, Wacław Jankowski, Jan Palczewski. Al la nova posteno de nia movado en Vilno, ni deziras plej kore sukceson kaj rapidan disvolvigon.

— La 21 de Oktobro en Klubejo de I.M.C.A. okazis prelego de D-ro S. Karlsbad pri Esperanto, ĝia ideo kaj ĝia celo. Ueestis ĉirkaŭ 150 auskultantoj kiuj danke aplaudis da parolinton.

En Klubejo de I. M. C. A. fondiĝis angulo esperanta.

Libroj kaj gazetoj.

SALO GRENKAMP-KORNFELD. „Krioj de l'koro“. Jaslo (Pollando) 1922. Paĝoj 30.

Malgranda libreto de lirikaj versaĵoj, skribita per lerta esperantisto, bone konanta la lingvon kaj la regulojn de versfarado.

M. L. KAPLAN. Akordoj esperantaj. Białystok (Pollando). 1922. Eldonejo J. Szapiro, Lipowa 33. Paĝoj 32, formato 10½ × 17.

Ankaŭ lirikaj versaĵoj! Ili aperas, kiel N° 2 de „Esperanta Librotrezoro“. La aŭtoro, iom tro fidema al la „poeta libereco“ rimigas ofte substantivojn kun adjektivoj, ekz.: „sango“ — „stranga“, „bilidon“ — „mildan“ k. t. p. Cetere, sentoj noblaj, stilo korekta.

J. ŚAPIRO (JOŚO). „Babiladoj de bonhumora Zamenhofano“. Białystok (Pollando). 1021. Paĝoj 42.

La libreto estas rekomendita de E. L. A. Ĝi prezentas spritan kritikon de la dormema vivo de esperantistaj societoj. Kelkaj karikaturnaj desegnoj vivigas la enhavon.

Dr. MAKSYMIJAN BLASBERG. „Medycyna a Esperanto“. Kraków. 1922. Paĝoj 6. Represo el N° 36 de „Polska Gazeta Lekarska“ (Pola Kuracista Gazeto).

Nia konata Krakova samideano priskribas en tiu-ĉi bonega artikolo en pola lingvo la signon de lingvo internacia por sciencistoj kaj speciale por kuracistoj. Menciinte la nediskuteblan superecon

de Esperanto rilate al aliaj provoj de lingvo universala, la aŭtoro detale traktas pri la ĝisnunaj sukcesoj de Esperanto en medicinaj rondoj. Vere bona servo al nia afero!

K. BRÜGGEMANN: a) „Esperanto-Lehrbuch für Schul,—Kursus—und Selbstunterricht“. b) „Unua Legolibreto (Rakontoj, fabeloj kaj popollegendoj)“. c) „Dua Legolibreto“ (El literaturo, arto kaj scienco). Ĉiuj 1022, ĉe Esperanto-Verlag Friedrich Ader, Dresden—A. 27.

La „Lehrbuch“ en germana lingvo estas dividita je 45 lecionoj sur 106 paĝoj, post kiuj sekvas la Fundamenta Gramatiko kaj vortaretoj sur 32 p. En antaŭparolo la aŭtoro klarigas sian opinion pri instrumetodo, laŭ kiu la ĝisnunaj lernolibroj estis tro koncizaj kaj troe ŝarĝis memoron de lernantoj. Tio, certe, dependas de kapableco de la lernantoj kaj ekzistas ankaŭ tiaj, al kiuj granda libro estas plej utila.

Bedaŭrinde, la aŭtoro ne konas suf.ĉe la sonojn de nia lingvo. En leciono III, p. 10, li konsilas la sonon „g“ elparoli (laŭ germana prononco): „dscho“, kaj la sonojn „j“ kaj „ŝ“ — tute egalmaniere: „scho“!

TH. CART. „Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto“. Laŭ „Universala Vortaro“ kaj la tri oficialaj aldonoj. Julio 1922. Paĝoj 32. Malpli ofte uzataj radikoj presitaj kursive, la radikoj de de l'Fundamento signitaj per steleto.

Jen verko, pri kies apero ĝojos ĉiu esperantisto! Ni ŝuldas varman dankon al nia eminenta Prezidanto de la Akademio kaj de la Lingva Komitato pro lia oferema laboro, kiu forigos ĉiujn dubojn pri uzebleco de iu ajn vorto, kiun oni kredas internacia. Ĝis nun nemultaj estis tiuj, kiuj posedis la Fund. Vortaron kaj la ambaŭ Aldonojn. Krome, la serĉado postulis ĉiam trarigardon de tri libroj.

Samtempe kun la vortaro, ni ricevis de la Prezidanto de la Lingva Komitato la komunikon de 5 Nov. 1922, el kiu ni sube represas la plej gravajn sciigojn.

VOĈDONADO PRI LANDNOMOJ. Post raporto de Prof. Grosjean-Maupin la Akademio, flankenmetante aliajn proponitajn solvojn, al la demando: „Ĉu konsilinda la simpla fideleco al la Fundamenta kaj tradicia „j“?“ respondis:

9 jes 2 ne 1 duba voĉdono.

Al la demando: „Ĉu vi aprobas la fidelan sintenadon de la landnoma demando“? respondis 87 L. K-anoj:

75 (2 kun rezervoj) jes 5 ne 2 dubaj voĉdonaj
6 sin detenis de voĉdono.

KREADO DE AKADEMIAJ KORESPONDANTOJ. Sekve de okazigita pri tiu temo voĉdonado, al la Regularo de la Akademio estos aldonata jena paragrafo XII. 21 (in fine):

„La Akademio havas la rajton elekti eĉ ekster la L. K., se bezone, Akademianj Korespondantojn. Se ili ne estas ja L. K-anoj, la Akademio petos de la L. K. aprobon, dank'al kiu ili farigos L. K-anoj. Ilia nombro ne devas superi la trionon de la Akademianoj“.

LA ELEKTOJ EN LA L. K.-ATON okazos dum la unuaj monatoj de 1923; en la Akademion poste, antaŭ la Nürnberga Kongreso.

LA ESPERO. Organ för Esperantorörelsen i Sverige N° 10, Oktobro 1922. Eldona Societo Esperanto, Stockholm I, Svedujo.

CORRIERE BALCANICO-ESPERANTISTA. Organo ufficiale dell'Accademia Balcanica di Bari. Monata. N° 15, 30 Settembre 1922. Accademia Balcanica, Bari. Via Abate Gimma, 52.

AŬSTRIA ESPERANTO-RAPORTO. 1922 №1. Vien VI, Mollardgasse 55.

MARTO. Oficiala organo de la Ligo Germanaj Esperanto-Societoj en Ĉeĥoslovakio. № 10, Oktobro 1922. Haida, Bohemio.

THE BRITISH ESPERANTIST. The oficial organ of the British Esperanto Association. Monata. № 211, Oktobro 1922 17, Hart Street, London [W. C. I.

Trie interesa artikolo de S. o W. M. Page, en angla lingvo, pri la raporto de la Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj pri Esperanto.

LITERATURA MONDO. Unua jaro. № 1 Oktobro 1922. Redaktoro Dro Teodoro Schwartz. Budapeszt VI, Andrassy—ut. 81. Monata.

Bela, enhavoriĉa, ilustrita literatura revuo nur en Esperanto, tre subteninda de ĉiuj, al kiuj estas kara la progreso de nia literatura vivo. Al hungaraj samideanoj ni sendas koran gratulon kaj varmajn dezirojn de plena sukcesol

ACADEMIA PRO INTERLINGUA. Direktoro Prof. G. Peano' Cavoretto-Torino; Kasisto Ing. G. Canesi, Via Castigliole 1, Torino V. „Discussiones“, №№ 4 (junio 1910), II 4 (sept. 1911), II 5 (dec. 1911), III 3 (majo 1912), III 5 (aŭg. 1912), IV 3 (okt. 1913), 1 (1922), 2 (1922), 3 (1922). „100 Exemplo de Interlingua cum vocabulario“ per G. Peano, dua eldono, Cavoretto—Torino 1913. „Formulario Mathematico“ per G. Peano, kvina eldono, Torino 1908. „Calendario Perpetuo per Pietro Satta“, Torino 1922.

LE MONDE ESPERANTISTE. Organo universel absolument indépendant. Dumonata. Julio—Aŭgusto 1922. 3, rue Sophie-Germain, Paris XIV.

FRANCE-ESPERANTO. Monata organo de francaj esperantistoj № 11 (35), Novembro 1922. 51, rue Clichy, Paris IX.

Eksterlandaj esperantistoj estas kore akceptataj ĉe la kunvenoj, kiujn la gazeto organizas en sia redakcejo ĉiun vendredon je 20 k. ½.

VEGETARANO. Oficiala organo de la internacia Vegetara Ligo Esperantista. Trimonata. № 1, Oktobro 1922. Oscar Bünnemann, Hamburg Fuhlsbüttel (Germanujo) Alsterkrugchaussee 586.

STENOGRAFI POLSKI. Organo de polaj Instituto kaj Unuiĝo stenografaj. Trimonata. № 4, oktobro-decembro 1922. Krucza 26/13, Warszawa.

ENIHAVO: *Jan Kostochi:* Malnova kaj nova Pollando. — *Baroko:* Sur margeno de Stranga heredaĵo. — *M. Kais:* Kiel instrui Esperanton. *Eska:* El la revoj. — Komunikoj, Libroj kaj gazetoj.

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Redakcio kaj administracio: Warszawa, str. Królewska 19.

Funkcias nur lunde kaj ĵaŭde de 8—10 h. vespere.

Presejo: Wacław Maślankiewicz. Warszawa, Nowogrodzka 17.